

TEA-BULTENO

4^a JARO








MARTO 2001

NUMERO 3



AGENDO



- 1 Ĵ
- 2 V Tradukado de Triestaj kantoj kun Anita 
- 3 S
- 4 D
- 5 L
- 6 M Ordigo de TEA-arkivo 
- 7 M
- 8 Ĵ
- 9 V Kartludado: Rumio 
- 10 S
- 11 D
- 12 L
- 13 M Ordigo de TEA-arkivo 
- 14 M
- 15 Ĵ
- 16 V Kviza vespero 
- 17 S
- 18 D
- 19 L
- 20 M Ordigo de TEA-arkivo 
- 21 M
- 22 Ĵ
- 23 V Promenante tra Triesto
- 24 S
- 25 D
- 26 L
- 27 M Ordigo de TEA-arkivo 
- 28 M
- 29 Ĵ
- 30 V Pri Trieste 2001
- 31 S

70^a Itala Kongreso de Esperanto

Trieste 28 julio - 1 aŭgusto 2001

Eŭropo 2001: Kulturoj - Lingvoj - Esperanto

Ho, kiel rapide pasas la tempo! Jam ĉeporde printempaj tagoj, varmetaj sunradioj revekas la naturon, kiu bunte kolorigas niajn pejzaĝojn. Ĉio invitas nin al promenado, al spirado de pura aero en la arbaro, ĉe la maro, en la sovaĝa Karsto.

Ho ve, tion ni absolute ne rajtas fari, ĉar ni estas tro okupataj. Jes, okupataj, ege okupataj, por organizi nian sed **PRECIPE VIAN** kongreson, por ke ĝi estu alloga, enhavoriĉa, senproblema kaj nur ĝuebla de ĉiu el VI!

Trieste atendas vin, deziranta proponi sin en sia plej bela vesto: Trieste, alloga kiel bela sinjorino, kies jaroj ne vualas ĝiajn ĉarmon kaj fascinon. Ĉi tiu urbo ŝajne sekvas proprajn ritmojn, tute ne postiras la efemerajn modojn, sed samtempe avangardas en pluraj kampoj.

Do, venu, malkovru mem ĝiajn plej kaŝitajn ecojn en mirinda etoso tut-internacia!

Ĝis nun aliĝis jam 125 personoj el Aŭstrio, Belgio, Britio, Francio, Hispanio, Italio, Japanio, Slovenio kaj Ukrainio: kion VI atendas? Rezervado de hotel-ĉambro estas nune tre konsilinda kaj oportuna. Ja, certe somere la vetero estas kutime fava, sed, kaze de pluvo kaj blovado de "bora", ĉu vi ŝatus dormi sub la pontoj?

Informo por tiuj kiuj partoprenos la UK-on: speciala aŭtobuso veturos por via komforto de Zagrebo al Triesto sabaton la 28^{an}, posttagmeze. Se tio vin interesas, bonvolu kontakti nin por mendo de la sidloko.



Elektu vi mem vian kategorion!

Verŝajne vi konsentas, ke la esperantistoj konsistas el multaj kategorioj, malgraŭ tio, ke oni ofte nomas ilin "samideanoj". Ni volas preparoli tiujn kategoriojn, kvankam ne eblas garantii, ke ni mencias ĉiujn.

1. Bonan-tagon esperantistoj

Ilia vortprovizo estas tro limigita. Kelkajn esprimojn ili bonege scias, ekzemple "bonan tagon", "kiel vi fartas?", "ĝis revido". Cetere ili ĉiam parolas nacilingve. Tre ofte ili portas grandan verdan stelon.

2. Eternaj komencantaj esperantistoj

Dum pli ol jardekoj ili jam studas la Internacian Lingvon, sed ili malmulte progresis. Kiam aliaj esperantistoj alparolas ilin, ili ruĝiĝas kaj ne scias respondi. Ĝenerale ili tre flue parolas nacian lingvon en Esperanto-kunveno.

3. Filatelist-esperantistoj

Ili volonte korespondas kun ĉiuj landoj, sed nur por interŝanĝi poŝtmarkojn. Cetere ili ne partoprenas esperantistan vivon.

4. Vortar-esperantistoj

Vortar-esperantistoj aŭ promenantaj vortaroj, kontraŭe, scias multege da Esperantaj vortoj, precipe tiujn, kiujn oni preskaŭ neniam bezonas. Sed en interparolo kun aliaj ili mallerte balbutas; ili neniam legas libron (krom vortaron), kaj korespondi ili ne ŝatas.

5. Gazet-esperantistoj

Ili opinias, ke ĉiu, kiu pli-malpli bone scipovas Esperanton, havas taskon verki gazet-artikolojn. Tiu kategorio senesperigas verajn redaktorojn. Iliaj plumfruktoj ne bongustas. Verkado postulas apartan talenton.

6. Klub-esperantistoj

Ili loĝas precipe en grandaj urboj, kie la verda movado floras. Ili regule vizitas la kunvenojn en propra klubo, sed tute ne interesiĝas pri la distrikta, pri la landa aŭ internacia movado, pri kongreso ktp.

7. Kongres-esperantistoj

Ili plejparte estas fraŭloj (ambaŭseksaj), loĝantaj izolite en malgrandaj lokoj. Ili havas amikojn en ĉiuj urboj, kie jam okazis internaciaj kongresoj. Sed en la propra loko, urbeto aŭ vilaĝo ili estas (kaj daŭre estos) la solaj esperantistoj.

8. Gramatik-esperantistoj

Ili fervore studas la teorion flankon de nia lingvo. Pri la plej subtilaj gramatikaj demandoj ili scias la sole ĝustan respondon. Ve, kiu uzas la lingvon ne laŭ iliaj konsiloj. Ĉiam ili havas la ruĝan krajonon en la mano.

9. Nur-esperantistoj

Ili estas homoj, por kiuj la zamenhofa kreaĵo estas la sole ĝusta vivocelo. Ili interesiĝas pri nenio alia. Neniam ili legas nacilingvan libron aŭ ĵurnalon. Ilia domo estas plena de esperantaĵoj. Ili portas verdan stelon, verdstelajn ringojn, manikbutonojn, poŝtranĉilojn, kraĵojn; eĉ nokto-vestoj estas ornamitaj kvintpintstele. En ĉiu rondo ili parolas daŭre pri Esperanto, ĉiun ili salutas esperantlingve. Ili estas la plej bonaj kontraŭ-propagandistoj de nia movado.

10. Politik-esperantistoj

Ili politikas sian ekstreman radikalan politikan opinion, prefere en la verda movado; verŝajne tial ĉar ekster tiu movado neniu aŭskultas ilin. Ili estas eksterordinare aktivaj. En ĉiu kunveno aŭ kongreso ili petas plurfoje la parolon, disdonas flugfoliojn, kunportas memverkitajn gazetojn ktp. Esperanto estas por ili politika ĉas-tereno.

11. Opozici-esperantistoj

Ili ŝatas aŭdi sin mem, sed oni malmulte povas diri, ĉu ili samopiniias kun la gvidantoj. Tial ili ĉiam estas kontraŭ la agoj de la plimulto. Ili ŝatas fortajn, akrajn kvalifikaĵojn kaj senfinajn lamentadojn. Se oni volas kredi al ili, ĉiuj aktivuloj en niaj organizoj estas trompantoj, profitemuloj aŭ diktatoroj.

12. Kritikemaj esperantistoj

Tiu kategorio daŭre observas, klasifikas kaj severe prijuĝas la samideanojn. Neniu taŭgas krom ili mem.

La saĝa leganto aŭ aŭskultanto verŝajne jam konstatis, ke la verkinto de ĉi tiu linio estas unu el la plej tipaj reprezentantoj de ĉi lasta kategorio. Probable ni forgesis kelkajn kategoriojn. Ĉu vi, leganto, jam renkontis vian

portreton? Aŭ ĉu vi apartenas al la 13^a kategorio?


13. La ordinaraj esperantistoj

Ili estas progresemaj homoj, kiuj interesiĝas pri multaj aferoj i.a. ankaŭ pri Esperanto. Ili uzas la lingvon praktike kaj klopodas disvastigi ĝin. Por ili Esperanto estas bona rimedo por atingi altan, tuthomaran kulturon.

(El "ESPERO KATOLIKA", 8/1980 kaj "PACIFIKA KURIERO" N 1)

Internacia Esperanto-Konferenco 2001

Strážnice, 14-20 julio 2001



Temo: Karolo Piĉ kaj liaj mondoj

Amika kaj familieca etoso, klerigaj prelegoj, viglaj diskutadoj, amuzaj vesperoj kaj kultura turismado en regiono *Moravske Slovacko*: ĉion ĉi eblis sperti, se vi partoprenas la ĉi-jaran OSIEK-aranĝon. Pliajn informojn petu rekte al la organizanto:

Vlada Hasala - Esperanto (IEK) - pk. 36

CZ-696 62 Strážnice, Ĉeĥio

Vizitu la paĝojn: <http://osiek.org>

Aliĝiloj haveblas ankaŭ de TEA-sekretario.



Varbiloj por la

14^a OSIEK-Konferenco

En la poŝtoficejo de Strážnice (Ĉeĥio) ekde la 11^a de novembro 2000 oni uzas, kaj uzados ĝis la 20^a de julio 2001, Esperanto-stampilon kun dulingva teksto:

Internacia Esperanto-Konferenco Strážnice

14-20.07.2001 - LA ESPERO

Krome de la 2^a de januaro rekomenditaj korespondaĵoj ricevas Esperantlingvan Reko-glumarkon, propagandcele de tiu internacia evento. Pluajn informojn vi povas ricevi de V. Hasala (vd. supre).



Pri la «Logo» de poŝta maŝin-stampilo

laŭ inĝ. Karel Kuĉa

Prof. Ján Göldrich

Enkadre de la organizaj preparoj de INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO en Strážnice, por bona, efika kaj multflanka propagando de la evento oni decidis pretigi poŝtan maŝin-stampilon, kiun uzados la loka poŝtoficejo jam sufiĉe frue antaŭ kaj dum la konferenco por konatigi pli larĝan publikon, precipe en Ĉeĥa Respubliko sed ankaŭ en aliaj landoj, pri la konferenco okazonta de la 14^a ĝis la 20^a de julio 2001.

La proponon de la maŝinstampilo kreis inĝeniero-arkitekto Karel Kuĉa el Praha, kiu mem diras pri tio: "Post pluraj meditoj mi decidis uzi iom abstraktan moti- von de tri spiraloj kiel la ondoj el la tuta mondo, kiuj renkontiĝas kaj reciproke influas".

Jes, la motivo de spiraloj aŭ spiralcikloj, kvankam iom abstrakta, tamen ĝisvorte provokas kaj proponas plurajn komprenojn, interpretojn aŭ klarigojn kaj do, la simbolo

ne estas tiel abstrakta, kiel povus ŝajni en unua momento.

La spiralo estas simbolo preskaŭ universala, eble iom magia, se ni konsideras ekzemple la rondojn aŭ spiralojn en la grenkampoj de suda Anglio, sed ankaŭ alie, kies deveno estas nekonata kaj ofte aljuĝata al eksterteraj, kosmaj estuloj. La spiralo, per kiu estas prezentataj ofte la kosmaj fenomenoj, simbolas en unua vico la disvastiĝadon de "io", de kio ajn; simbolas certan ripetadon sur pli altaj niveloj, simbolas certan similecon, sed ĉiam ankaŭ ion novan. Do, la spiraloj vere simbolas la variecon (ekzemple ankaŭ la variecon de la temoj traktataj dum **INTERNACIAJ ESPERANTO-KONFERENCJOJ**), sed povas simboli, krom alie, diversajn sferojn apartajn, sed tamen interne kunligitajn; povas simboli la purajn formojn de "io", ankaŭ la moralajn kapacitojn de la vivo evoluanta, povas simboli la lumon, kiu disvastiĝas el centro, sed same ankaŭ la mallumajn epokojn de militoj, de mortigado kaj detruo, de malbono ktp. Simple la agadojn proksimajn aŭ identajn kun la infero, sed same ankaŭ la epokojn de progreso, la statojn de konscio kaj de klereco. La spiralo povas simboli, ni diru, unuigitajn homojn de diversaj nacioj, unuigitajn ŝtatojn de ĉi Tero, povas prezenti la mondoŝtaton aŭ la mondoŝtatojn pozitive kaj favore evoluantajn kaj kunlaborantajn, ni diru ankaŭ surbaze de unu lingvo, de nia lingvo Esperanto, iam en la malproksima estonteco.

Plue, la spiralo povas simboli disvolviĝantan konadon kaj saĝecon, la novajn kvalitojn de vivo, la novajn spertojn, faktojn kaj ideojn, ĉar nenia projekto povas realiĝi sen unue esti ideo. La spiralo povas simboli ankaŭ diversajn regnojn kiel ekzemple la plantan, animalan, homan ktp. Kaj ĝi povas ekzemple simboli la "regnon de Esperanto" (mi scias, ke la ebleco estas dume ege fikcia, sed tamen nenio malhelpas pensi pri ĝi kiel pri eventuala ebleco); ja la spiralo estas fundamento por daŭrigo kaj senfino, por evoluaj kontrastoj, la spiralo estas longa vojo, la granda aventuro de evoluo kaj de la vivo – kaj Esperanto vivas, la spiralo do estas ankaŭ ĝia vojo.

La spiralo do prezentas la kosmajn sed ankaŭ surterajn simbolojn (ja ankaŭ nia vivsignifa Suno troviĝas sur la rando de la loka spirala brako de nia galaksio – Lakta Vojo): ĝi prezentas ankaŭ genian sistemon de ĉio vivanta en la tuta universo.

Mi do opinias, ke inĝ. Ark. Karel Kuča elektis bonan kaj konvenan "logon" por IEK 2001 en Strážnice.

Ankoraŭ pri filatelo...

Ricevis premion "Origita arĝento" la kolekto de Esperanto-poŝtmarkoj de Terttu Osterman en Svedio dum la ekspozicio NORDIA-2000.



Ĉe la itala RADIO 1 oni parolas pri lingvoj

Ĉiun sabaton, je la 10^a horo oni disaŭdigas programon, kies temo koncernas Eŭropon kaj ties lingvojn, inkluzive de Europanto. Dum ĝi oni proponas diversajn kvizojn, kiel ekzemple diveni poeziaĵojn skribitajn en tiu lingvo! Kiu emus altelefonon kaj proponi la temon ESPERANTO? La telefonnumeroj estas: 06-8001155 (**RADIO RAI**) kaj 06-33542834 (tiu programo). La programprezistoj estas Umberto Broccoli kaj Tiziana Simoni.

(el *NOVA SENTO*)



IOM PRI MONO

El artikolo de Hans Bakker
en la retbulteno Kuko-6

Ĉu vi scias, kiel funkcias la **Fondaĵoj** de UEA? Kiujn aŭ kion vi subtenas sendante vian mondonacon al tiu aŭ al tiu alia Fondaĵo?

Ĉi sube kelkaj klarigoj, kiuj certe stimulos vin eventuale pripensi, ke jes, estas la momento por ekdoni vian mon-kontribuon: por ke tiuj fondaĵoj havu la eblon pli intense agadi, helpi pli da nepagipovuloj, pliriĉigi la Esperantan kulturon, disvastigadi nian lingvon ktp.

SOCIETO ZAMENHOF invitas pagi duoblon de la kotizo por doni ekstran financan apogon al la Asocio. Kompense, la societanoj ricevas kelkfoje jare personan leteron de UEA-prezidanto kaj akcepton dum la universala kongreso. Vidu Jarlibron 2000, pĝ. 8.

Tiam foliumu al pĝ. 27, kaj vidu, kiuj kontribuis grandajn sumojn por aĉeti la domon de UEA en Rotterdam. Sen tiuj sumegoj nia instanco ne posedus domon. Ĉiu ĉambro portas la nomon de unu tia donacinto. Ankoraŭ nun oni konstante kolektas donacojn por la Fondaĵo **OFICEJA ILARO**. Ĝi estas menciita je pĝ. 39, inter dudek aliaj fondaĵoj.

Fondaĵoj **AFRIKO**, **AMERIKO** kaj **AZIO** kolektas donacojn por malriĉaj sed aktivaj esperantistoj en tiuj kontinentoj. Ne ekzistas Fondaĵo **ORIENTA EŬROPO**, kvankam ankaŭ tie homoj estas ĝenerale tre malriĉaj kaj ne povas pagi kotizon al UEA. Antaŭ la jaro 1989 tiu situacio estis alia: la registaroj subvenciis la Esperanto-asociojn tie. Unu el la plej aktivaj landoj estis Jugoslavio. Kiam la interetna malamego fajrigis la militon inter la respublikoj kiuj ĝis tiam estis unu ŝtato, ĉio falegis. Post kiam la cindroj kovris la teron kaj la kadavrojn, la esperantistoj devis rekomenci de nulo. Tiam UEA-estrarano Renato Corsetti kuraĝe rompis la tabuon, ke UEA ne devas okupiĝi pri io alia ol esperantista agado. Li alvokis esperantistojn okupiĝi pri la sorto de samideanoj en detruita Jugoslavio. La reago estis granda: solidaraj donacoj venadis al la nova Fondaĵo **KONTO ESPERO**. Tiu, kiu perdis sian domon, ricevis sumeton (ekzemple \$100) por helpi la rekonstruon. Simile tiu, kiu perdis sanon, laboron ktp, ricevis iom da helpo per tiu Fondaĵo. Kiam pasis la tempo, ankaŭ viktimoj de naturaj katastrofoj povis ricevi helpon, ne nur en Jugoslavio sed en la tuta mondo. Bedaŭrinde ankaŭ Afrikanoj bezonis foje tiun Fondaĵon. Ekzemple, antaŭ nelonge la domo de malagasa esperantistino forbrulis. Fondaĵo **ESPERO** donis \$100. Aliaj esperantistoj donacis librojn por ŝia cindriĝinta biblioteko.

Fondaĵo **CANUTO** portas la nomon de iama prezidanto de UEA, lia-honore. Tiu Fondaĵo membrigas en UEA centojn da esperantistoj kiuj mem ne povas pagi sian kotizon. En Afriko preskaŭ neniu pagas sian membrecon.

TRIAMONDA KONGRESA FONDAĴO celas gastigi triamondanojn en UK. La flugbileton UEA neniam donacas, nuntempe, sed por kelkaj ĝi povas pagi la restadon. Kotizo, loĝado, manĝado, poŝmono, asekuro dum unu semajno kostas de \$300 ĝis \$400. La Fondaĵo povas pagi por nur kvar gastoj. Unu el ili estas Afrikano. Jam estas elektita la gast-partoprenonto en la 86^a UK.

VOLONTULA FONDAĴO pagas parton de la kostoj por gejunuloj kiuj restadas en la Centra Oficejo dum kelkaj

monatoj por spertiĝi kaj helpi. Ankaŭ tiu stipendio estas modesta: ne la flugbileton ĝi pagas, sed poŝmonon kaj luon de ĉambro en la Oficejo. En la subtegmentejo de la domo estas tri ĉambroj por gastoj aŭ volontuloj. Kutime unu el tiuj estas loĝata de volontulo kiu laboras plentempe por TEJO.

Ĉu ne estas miraklo ke kelkaj miloj da pagi-povaj esperantistoj kontribuas tiom da mono por tiom da fondaĵoj, tiom da agado? Kaj strange... ĝuste tiuj, kiuj havas malgrandajn enspezojn, apartigas el propra malmulto iom por donaci al aliaj!

Dungito ĉe loka E-grupo

Post du jaroj da klopodoj, antaŭ unu semajno, nia loka esperantista grupo sukcesis dungi junan viron por plikreskigi la aktivadon de la asocio kaj informi pri ties celoj, ĉefe diskonigo kaj instruado de nia lingvo. Li deĵoras 35 horoj semajne! Grandparto de la salajro estos pagata de la franca ŝtato (kadre de leĝoj favoraj al senlaboruloj), cetero de entreprenisto simpatianta, malgranda parto de ni lokuloj kaj de SAT-AMIKARO parizana.

Du aliaj samaj postenoj por junuloj estas jam starigitaj en Francio, en St. Briec kaj Montpellier. Certes tio ĝojigos kaj kuraĝigos nin ĉiujn tra la tuta mondo.

Informis René Ballaguy rene.ballaguy@wanadoo.fr

Esperanta kompaktdisko-2001

Esperanto-Klubo ĉe la moskva konstru-instituto MASI iniciatas novan, longdaŭran projekton kaj kore invitas ĉiujn interesiĝantojn, rusiajn kaj eksterlandajn, aktive partopreni ĝin! La nuna jaro, malfermanta la 21^{an} jarcenton, perfekte taŭgas por eki ion tian!

Temas pri Esperanto-kompaktdisko-2001, kiu estos kompletigata kaj korektata ĉiujare (do, aperos EKD-2002, EKD-2003 ktp). La EKD-2001 aperos dum Ok-SEJT (aŭgusto 2001), sed provekzemplerojn eblas vidi jam dum EoLA en marto. Nun jam estas kolektita kaj enkomputiligita abundega materialo (tekstoj, kantoj, ilustraĵoj, fotoj) kaj la laboro senĉese daŭras. Eventuala titolo de la EKD: **2001 - JARO DE LINGVOJ**.

Do, ni petas al:

aktivuloj kaj fakuloj - dokumentojn kaj ajnajn materialojn - ĉu ere, ĉu (prefere) jam komplete - por ajna enhavero;

eldonistoj - enkomputiligatajn tekstojn kaj ilustraĵojn;

kantistoj kaj deklamantoj - surbendigitajn kantojn kaj poemojn kun la tekstoj;

moskvanoj kaj gastoj de la ĉefurbo - veni al nia studio kaj legi sonigindajn tekstojn;


spertuloj - konsilojn;

ĉiuj koncernuloj - RAJTON uzi viajn verkojn, eldonaĵojn, ilustraĵojn, kantojn, voĉojn - en nia komuna EKD!!!

Kiuj deziras kunlabori aŭ havi pliajn informojn pri la provizora enhavo de la EKD-2001, bv. alturni sin al:

Irina Gonĉarova mirina@online.ru

La Zagreba UK superis la UNUAN milon Komence de februaro 1070 kongresanoj el 50 landoj aliĝis al la 86^a Universala Kongreso de Esperanto. Pintas en la statistiko Francio, Germanio kaj la gastiganta lando Kroatio; el Italio 49 personoj.



Nova PIV antaŭmendebblas

Dum sia kongreso en Moskvo, SENNACIA ASOCIO TUTMONDA decidis, ke eblas jam antaŭmendi la novan, ĝisdatigitan, eldonotan version de Plena Ilustrita Vortaro - Piv. La vortaro kostas por privataj personoj 60 eŭrojn, por libroservoj 50 eŭrojn. La prezo de Piv post la apero estos ĉirkaŭ 70 eŭrojn. Informoj kaj mendoj ĉe:

SENNACIA ASOCIO TUTMONDA

67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris

Rete: satesper@cybercable.fr

Malta Esperanto-Societo 40-jariĝo (1961-2001)

Festante sian 40-jariĝon, MALTA ESPERANTO-SOCIETO invitas esperantistojn konkursi per unu ĝis tri poŝtkartoj pri sia lando/urbo.

Tri lotumitaj partoprenintoj ricevos, kiel premiojn, librojn pri Malto. La poŝtkartoj estos poste ekspoziciataj.

Partoprena limdato: 30^a de aprilo 2001. Surdorse de almenaŭ unu poŝtkarto, bv skribi vian nomon kaj adreson kaj sendi al: MALTA ESPERANTO-SOCIETO, P.O. Box 142, Valletta, CMR 01, Malta.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

378 PETOJ EN 2000



Unu el la plej gravaj edukaj stabloj de la Esperanto-movado, KSM de UEA vikle servis la korespondemulojn ankaŭ en 2000, dum kiu ĝi ricevis entute 378 korespondetojn el 53 landoj. La nombro da petoj tre varias de jaro al jaro - ekde 1993 inter 362 kaj 579 - depende de hazardaj pintoj en unuopaj landoj. En 1999 KSM ricevis 428 petojn: same kiel en tiu jaro, ankaŭ ĉi-jare plej multe da petoj venis el Francio, nome 80 (96 en 1999 kaj 70 en 1998). La duan lokon okupis Rusio kun 76 petoj: ĝi estas lando, kie la nombro stabile kreskas - 38 en 1998 kaj 56 en 1999. La tria granda kliento de KSM estas Brazilo: 54 petoj en 2000, 39 en 1999 kaj 59 en 1998.

Tiuj tri landoj senkompare distingiĝas disde ĉiuj aliaj: sur la kvara loko staras Senegalio kun 10 petoj, sekvata de Germanio, Hungario, Irano kaj Kubo kun po 9 petoj.

De 1990 KSM estas prizorgata de s-ro Francois Xavier Gilbert. La adreso estas:

B.P. 6, FR-55000 Longeville en Barrois, Francio.

Informilon kaj aliĝilon oni povas peti kontraŭ unu respondkupono. Por rekte ricevi adresojn de korespondemuloj, oni sendu du respondkuponojn kun detalaj indikoj pri si mem kaj pri la dezirataj korespondantoj.

La retadreso de KSM estas <ksmesperanto@aol.com> kaj oni povas viziti ĝin ankaŭ per ĝiaj TTT-paĝoj, en 6 lingvoj, ĉe: <http://www.multimania.com/kosomo>

Enhavo de ĉi tiu Bulteno ŝuldeblas al RET-INFO

BULTENO de la membroj de

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste

Tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@tiscalinet.it

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349